Mi nepre ŝanĝiĝis en Mabelon. Mi penos deklami 'Rigardu! Jen abelo vigla.'"

Kaj kruciginte la manojn sur la genuoj same kiel en la lernejo kiam ŝi ripetas parkeraĵojn, ŝi komencis tiun konatan poemon. Sed ŝia voĉo sonis raŭka kaj nepropra, kaj eĉ la vortoj ne tute similis la originalajn.

*Rigardu! Jen la krokodil'!*
*La voston li netigas;*
*Ŝprucante akvon el la Nil'*
*La skvamojn li briligas.*

*Senmova restas la buŝeg',*
*Li ungojn kaŝas ruze;*
*Jen fiŝoj naĝas tra l' kaveg'*
*Frapfermas li amuze.*

"Jen certe ne la ĝustaj vortoj" diris Alicio malĝoje, kaj denove la okuloj pleniĝis de larmoj, dum ŝi daŭrigis: "Do, mi nepre estas Mabelo malgraŭ ĉio; sekve mi devos loĝi en tiu ŝia mallarga maloportuna domaĉeto; mi havos neniun ŝatindan ludilon, kaj devos lerni sennombrajn lecionojn. Ne! Pri tio mi decidiĝis. Se mi estos Mabelo, mi restos ĉi tie, kaj neniom utilos ke oni demetu la kapon ĉe la enirejo al la tunelo kaj diru per karesa voĉo 'Resupreniru, karulo.' Mi nur rigardos supren kaj demandos 'Kiu do mi estas? Vi certigu tion, kaj *poste, se mi ŝatos esti tiu persono*, mi konsentos supreniri. Se ne, mi restos ĉi tie, ĝis mi fariĝos iu alia.' Sed



ho ve! mi tre, tre volas ke oni v
longan tempon mi restas tie ĉi t
sopiras la hejmon."

Dirante tion ŝi okaze rigardis l
rimarkis mirigite ke ŝi vestis—d
—unu el la blankaj kapridfelaj
Kuniklo.

"Kiel ajn mi faris *tion*?" pens
denove malkreskas."

Ŝi stariĝis, kaj irinte al la tablo
mezuri sin, eltrovis ke nun ŝi hava
sesdek centimetrojn da alteco,
rapide malkreskas. Certiĝinte k
la ventumilo, ŝi tuj lasis ĝin fa
apenaŭ ŝi evitis la malagrabla
ĝis nulo.

"Jen evito vere mirakla! Ĉa
nuliĝis!" diris Alicio, iom ti
subita ŝanĝo, "tamen estas bona
ankoraŭ ekzistanta; kaj jam n
eniri la ĝardenon." Ŝi do kur
pordeto; sed ho ve! ĝi refermi
ora ŝlosileto kuŝis, kiel antaŭe, su
"la afero staras pli malprosper
plordiris, "ĉar neniam mi esti
malgranda, estas ja ne tolereble.

En la momento kiam ŝi diris
glitis, kaj ŝi trovis sin plaŭde enf
akvon. Subakviĝinte ĝis la me

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN